

Wilhelm Müller,

Ĉe puto antaŭ  
l'urbo

*tradukita de Ludwig Emil  
Meier (kaj aliuloj)*

Ĉe puto antaŭ l' urbo  
jen staras la tili',  
en kies ombro dolĉe  
revadis ofte mi.  
Mi tranĉis en la ŝelon  
amsignojn pro memor';  
sopir' min tien logis  
en ĝojo kaj dolor'.

En lasta nokto pasis  
mi preter la tili',  
sed malgraŭ la malhelo  
okulojn fermis mi.  
Jen ĝiaj branĉoj muĝis  
kaj ŝajnis logi min:  
"Restadu, ho migrulo,  
ni trankviligos vin!"

La vento kontraŭblovis,  
ĉapelon ŝiris for.  
Sed pelis min antaŭen  
turmentoj de la kor'.  
Se plue mi vagadus  
eĉ ĝis la monda fin',  
la branĉoj ĉiam logus:  
"Ni trankviligos vin!"

...

Wilhelm Müller,

Der Lindenbaum

Am Brunnen vor dem Tore  
Da steht ein Lindenbaum  
Ich träumt in seinem Schatten  
So manchen süßen Traum  
Ich schnitt in seine Rinde  
so manches liebes Wort  
Es zog in Freud und Leide  
Zu ihm mich immer fort

Ich muß auch heute wandern  
Vorbei in tiefer Nacht  
Da hab ich noch im Dunkel  
Die Augen zugemacht  
Und seine Zweige rauschten  
Als riefen sie mir zu:  
"Komm her zu mir, Geselle  
Hier findest du deine Ruh."

Die kalten Winde bliesen  
Mir grad ins Angesicht  
Der Hut flog mir vom Kopfe  
Ich wendete mich nicht  
Nun bin ich manche Stunde  
Entfernt von diesem Ort  
Und immer hör ich's rauschen:  
"Du fändest Ruhe dort."

...

Wilhelm Müller,

La tilio

*tradukita de Ludwig Emil  
Meier*

Ĉe l'puto antaŭ l'urbo  
Jen staras la tili',  
En kies ombro dolĉe  
Revadis ofte mi.  
En ĝia ŝel' tranĉite  
Vidiĝas ama dir',  
Kaj daŭre min altiras  
Al ĝi la korsopir'.

Hodiaŭ, ĉe noktmezo  
Mi pasis ĝin, migrul',  
Ho! Spite la malhelo  
Fermiĝis la okul'.  
Sed ĝiaj bonaj branĉoj  
Alvokis ŝajne min:  
"Alvenu, ho junulo,  
Ni repacigos vin!"

Alblovis vent' malvarme  
Kun granda energi',  
Ĉapelon ĝi fortiris,  
sed ne turniĝis mi.  
Kaj nun, post kelka mejlo  
De interspaco, ho!  
Ankoraŭ bruas l'arbo.  
"Ĉe mi paciĝu do!"

...

Traduko de la Germana poemo “Der Lindenbaum” de WILHELM MÜLLER (\*1794-10-07 – †1827-10-01) en Esperanton de Ludwig Emil Meier (kaj aliuloj).

Arg-83-164 (2003-11-09 21:14:39)

Tiu ĉi traduko troviĝas en la germana Esperanto-lernolibro “Post la kurso” de WILHELM kaj HANS WINGEN, sur paĝo 68. Sube estas indikite tie: “Laŭ L. E. Meier k. a.”. El tio oni povas konkludi, ke ĝi ne estas la origina tradukversio de L. E. MEIER kaj ke ĝi estas iom ŝanĝita de aliuloj, eble de la fratoj WINGEN mem.

Verkinto de tiu ĉi Germana poemo estas WILHELM MÜLLER (\*1794-10-07 – †1827-10-01), publikigita 1822.

Arg-83-163 (2003-12-28 22:57:42)

Mi trovis tiun originan version en la TTT sub <http://ingeb.org/Lieder/AmBrunne.html>

Traduko de la Germana poemo “Der Lindenbaum” de WILHELM MÜLLER (\*1794-10-07 – †1827-10-01) en Esperanton de LUDWIG EMIL MEIER (\*1847-02-16 – †1919) en 1907.

Arg-83-166 (2014-05-31 14:26:54)

Tio estas la origina tradukversio de L. E. MEIER. Ĝi troviĝas en la kantlibreto “Esperantista Kantaro”, kiun eldonis HANS TH. HOFFMANN en 1907 en sia eldonejo en Berlino, Steglitzer Str. 44. Tiu ĉi esperantigo troviĝas ankaŭ en [http://kantaro.ikso.net/la\\_tilio](http://kantaro.ikso.net/la_tilio). Vidu ankaŭ: <http://194.95.59.225/index.php?id=3623>.